

KOMERCO FAVORU ESPERANTISTOJN

Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO)

AMO 73, kunlabore kun IKEF

Majo 30, 2021 (dimanĉe) ekde 12:00 UTC



IKEF

Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

IKEF en la mondo de UEA

- UEA provas altigi la profilon de la ses aliĝintaj Fakaj Asocioj.
- El tiuj ses, IKEF estas la laste akceptita (1994).
- IKEF ege intense agadas, per ĉiusemajnaj dimanĉaj ret-kunvenoj.
- IKEF pli fortas ekster Eŭropo (kontraste al la aliaj aliĝintaj FA).



La potencialo de komercado

- Esperantistoj povas je sia avantaĝo komerci.
- La lingvo donas unikajn eblojn por transnaciaj komercadoj.
- Esperanto permesas ligojn ekster la kutimaj komercaj kanaloj.
- Esperanto donas unikan merkaton – eĉ se niĉan.
- *Slogano: Eĉ niĉa komerco povas esti riĉa!*



La etendiĝo de IKEF – 19 filioj

Regiono	Filioj	Sume
Afriko	Angolo, Kongo DR, Madagaskaro, Niĝerio, Senegalo, Sud-Afriko, Tanzanio	7
Ameriko	Argentino, Brazilo, Nordameriko (CA,US)	3
Azio	Ĉinio, Irano, Japanio, Koreio, Mongolio, Nepalo, Uzbekio.	7
Eŭropo	Pollando	1
Oceanio	Aŭstralio	1

Fondiĝas sub-fakaj asocioj ene de IKEF: pri Agrokulturo kaj Turismo.
En Eŭropo: deziro pri filia fondo ekzistas en Bulgario kaj Hungario.

Fonto: ikef.info/ligilo kaj retmesaĝo el marto 2021.

La retejo de IKEF

- Tre efike trovebla – tuj prezentita de serĉprogramoj.
- Donas aliron ankaŭ la Facebook, Twitter kaj pliaj sociaj retejoj.
- Prezentas la informojn en 12 lingvoj.
- Prezentas informojn pri la Dimanĉa Kunsido (DK), Sezona Kunsido (SK).
- Proponas aŝtabulon: Komerca Anoncejo (KA), plie uzinda.
- Trovu ĉe: **ikef.info**



Programo de AMO 73

- **Ĉiuj horoj laŭ UTC**
- 11:45-12:00: Malfermo de la Zoom-ejo
- 12:00-12:05: Enkonduka parolado de s-ro Stefan MacGill
- 12:06-12:31: Historio de IKEF, s-ro Ludoviko Zhao Cheng Hua (Ĉinio) kunlabore kun s-ro Roland Rotsaert (Belgio)
- 12:32-12:57: Pri lastatempaj agadoj de IKEF, s-ro Chimedtseren Enkhee (Mongolio)
- 12:58-13:23: Mia komerco en Esperanto, s-ro Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio)
- 13:24-13:34 Paŭzo
- 13:35-14:00 Pri uzo de Myriad (ĉifromono) kaj komerco, s-ro SABIYUMVA Jérémie (Burundo)
- 14:01-14:26: Esperanto-instruado kaj internacia komerco kiel primaraj fundamentoj de la esperantista ekonomio, s-ro Fabricio Valle (Brazilo)
- 14:27-14:52: Komerco je ajloj, s-ro John Huang (Kanado)
- 14:52-15:00: Fermo

Konkludoj

- UEA pli forte apogu siajn aliĝintajn fakajn asociojn.
- UEA rekonu la valoron de agado, kiu povos doni enspezofonton, precipe por malpli prosperaj membroj.
- IKEF fortigu ligojn kun aliaj fakaj asocioj: ILEI (financa klerigado), UMEA (medicinaj solvoj), IFEF (ligoj kun liverantoj de fervojaj komponentoj), ISAE (sciencaj aparatoj kaj komputilaj programoj), LIBE (helpiloj por handikapuloj) kaj aliaj.
- IKEF daŭrigu la fondon de sub-fakoj, por malnecesigi la starigon de apartaj kaj eventuale efemeraj FA por ĉiu unuopa fako. IKEF povas proponi pli sekuran tegmenton.



IKEF

Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio